



Kazuaro, aŭstralia birdo



Esperanto sub la Suda Kruco

Julio-Aŭgusto 2003
Numero 63 (Vol. 11, no.4)



ISSN 1039-9380

Esperanto sub la Suda Kruco

Oficiala organo de la Aŭstralio kaj la Nov-Zelanda Esperanto-Asocioj

Numero 64 (volumo 11, numero 4), Julio-Aŭgusto 2003

Redaktoro: Donald Broadribb

PO Box 643, York WA 6302, Aŭstralio

☎: (08) 9641 1937

Faksoj: (08) 9641 1134

E-poŝto: sudakruco@sudakruco.org

Libroservo

Libroservo de AEA, Esperanto-Domo, 143 Lawson St, Redfern, NSW 2016, Aŭstralio. E-poŝte: libroservo@ans.com.au

Korespondaj kursoj

Hazel Green, 44 Towoomba Road, Oakey Qld 4401, Aŭstralio. E-poŝte: hazgreen@twmba.net

SE VI DEZIRAS LEGI PRI IO, VERKU ARTIKOLON!

Jes, ĉu vi ne ofte pensis kiam vi elkovertigis vian novan ekzempleron de *Esperanto sub la Suda Kruco*: "Ni vere bezonas artikolon pri ...?" Do sendu tiun amatan eseon, ideon, rakonton, esprimon de vidpunkto, leteron, desegnaĵon, foton. Ni preferas ke vi sendu vian kontribuon per e-poŝto, al la adreso: sudakruco@sudakruco.org; vi povas ankaŭ sendi ĝin sur Zip-disko (100mb aŭ 250mb), sur komputila disko (Mac aŭ Windows), sur KD, aŭ sur papero. Se vi sendas sur papero, la teksto devas esti klare tajpita per freŝa rubando. Tajpu sur nur unu flankon de ĉiu folio, kun ekstra spaco inter ĉiuj linioj. Netajpitajn manuskriptojn ni ne akceptas. La redaktoro rajtas redakti, korekti kaj konformigi al la stilo kaj kutimoj de ĉi tiu gazeto ĉiun tekston antaŭ aperigo. Laŭbezone teksto povas esti mallongigita. Pri la enhavo de artikolo respondecas nur ĝia aŭtoro.

EN ĈI TIU NUMERO

La sonĝo (Trevor Holton).....	3
Recenzoj: <i>Pinokjo</i> , <i>Blankaj noktoj</i>	4
Karuselo en formo kaj koloro (Franciska Toubale).....	7
La novzelanda kongreso (Franciska Toubale).....	8
Mia rondiro en la suda insulo de Nov-Zelando (Franciska Toubale).....	10
Interrete	12
Nekrologo: Florence Fay Koppel	14
Diversaĵoj	15
Koreo/Koreio?	17
From our readers: Paul Desailly.....	18
La 94a mondkongreso de Rotario.....	19
Liro-2003	20
For the Beginner.....	21
Kongreso 2003 en Christchurch, Nov-Zelando.....	25
Libroservo de AEA	29
Konkursetoj 1 kaj 2: rezultoj.....	30

La Sonĝo

de Trevor Holton

La pasintan nokton mi sonĝis pri malbona sperto koncerne esperantan konferencon:

Mi telefonis por registri min en la konferenco, sed oni diris al mi: "Mi bedaŭras ke la konferenco estas tute elregistrita."

"Ĉu mi povus ĉeesti ĉiukaze kaj eble iu alia nuligos, aŭ kelkfoje ne ĉeestos?"

"Ne, tio ne okazos, ne ĝenu vin!"

La tago de la konferenco alvenis, do mi decidis ĉeesti malgraŭe.

Homoj amasiĝis ĉirkaŭe en la registrado-areo; la loko zumis pro aktiveco. Mi penis altiri la atenton de la sinjorino malantaŭ la servtabulo, sed kiam ajn mi pensis ke mi demandos ŝin, ŝi forpostulatis por servi tujan problemon.

Atendante mian ŝancon, mi ekzamenis la elmontritan programon de okazaĵoj. Kep Enderby enlistiĝis kiel la unua parolisto, pri la temo: "La Universaleco de Esperanto."

Finfine, ĉiuj ĉeestantoj moviĝis en la lekcicambron por la parolado de Kep Enderby. La registradoĉambro estis preskaŭ malplena. Mi decidis ke nun estis mia ŝanco aŭdigi min.

Mi alproksimiĝis al la servtabulo. La sinjorino sidis tie, dormante!

"Pardonu min," mi komencis, "Mi penis rezervigi por tiu konferenco antaŭ du monatoj, sed vi al mi diris ke ĝi estis tute rezervita."

"Kial homoj vekadas min por ke mi nur devu redormi denove?" Ŝi respondis.

Ĉi tiu nezorganta sinteno frenezigis min. Laŭte mi komencis kriegi: "Ĉi tio estas hontega, vi devus rezervi pli grandan lokon se tro multaj homoj deziris ĉeesti!"

Ĉi tio incitis neniun ajn reakcion. Estis evidente ke estis sen utilo resti tie pli longe. Mi etendis mian brakon por mia palto kaj surmetis ĝin, por indiki mian foriron.

Mi plipasiĝis kaj kriegis pli laŭte al la sekretaria sinjorino. "Mi supozas ke mia Esperanto ne estas suface bona por vi. Ĉi tio devas esti konferenco por superaj parolantoj."

Mi esperis altiri atenton de la konferencoĉeestantoj, sed nenio okazis. Mi moviĝis direkte al la ekstera pordo kun la intenco brufermegi ĝin malantaŭ mi por pli granda efekto.

"Vi ŝovu Esperanton!" mi kriegis, "Ĝi estas ne utila por iu ajn!"

Bedaŭrinde, infano obstrukcis min, kiam mi penis brufermegi la pordon. Mi estis hezitanta, kaj estis perdinta la efekton kiun mi penis krei.

Mi formovis la infanon kaj ripetis: "Vi ŝovu Esperanton, ĝi estas senutila!"

La pordo ne brufermegiĝis, sed nur faris siblan, triumfan sonon.

Mi promenis malsupren sur la ŝtuparo.

Neniu kuris post min.

Mi promenis al la tramo, sola.

Ĉu ĉi tio indikas eblecon ke Esperanto estos tiom populara ke ni devos ekskludi personojn? Eble estas danĝero ke ĝi venkakiros personojn kiuj

deziros fari ĝin ekskluziva, aŭ rango-simbolo?

Gardu vin!
Ne lasu mian sonĝon iĝi realeco. □



Recenzas via Redaktoro



Carlo Collodi: *La aventuroj de Pinokjo*. Tradukis Jozefo Horvath. Ilustraĵoj de Enrico Marzanti, el la originala itala eldono 1883. Antverpeno: flandra Esperanto-Ligo, 2003. 157 paĝoj. Broŝurita.

Takso: ●●●●

Ĉi tiu porinfana libro fariĝis klasika verko en la mondliteraturo. Ĝi unuafoje aperis en Esperanto en 1930, tradukite de Mirza Marchesi, kun ilustraĵoj de W. H. Matthews. Dua eldono de tiu traduko estis publikigita en 1981.

La temon de la verko konas preskaŭ ĉiuj personoj kiuj iam estis infanoj. Majstro Ĝepeto ĉizas marioneton el ligno, kiu vivas ekde kiam li tuŝas la lignon, aŭ eble jam antaŭ tiam. La marioneto, nomata Pinokjo, havas bonan koron, sed malmulte da saĝo. Li plej esperas fariĝi vera infano, anstataŭ ligna pupo, sed li estas klasika ADHD-ulo,¹ kaj ne povas rezisti eĉ la plej malprobablajn proponojn de aĉuloj, nek povas plenumi la konsilojn de helpemuloj boncelaj.

Tamen, finfine Pinokjo ja lernas per siaj spertoj, kaj lia esence bona koro pruvas sian karakteron. Rekompenca, li fariĝas vera homa infano.

Infanoj kutime ne rimarkas la evidentajn moralinstruojn kiuj estas disŝutitaj tra la tuta verko, do tiuj (kiuj tre ĝenas la legplezuron de plenkreskulo) tute maltrafas ilin, feliĉe.

Kiel klasika verko, kiun ĝuegas la infanaro, la pluekzisto de *Pinokjo* en esperantlingva traduko estas salutinda.

Du hezitemaj kritikoj: la nova traduko farita de Horvath ne ŝajnas al mi pli bona ol la jam klasika traduko farita de Mirza Marchesi, kaj ĝi malpli senĝene fluas. Kvankam ambaŭ tradukoj iom tro fidelas al la stilo de la itala originalo, kaj legiĝas kiel evidentaj tradukaĵoj, tiu de Marchesi estas iomete pli plezuriga. Rilate al la ilustraĵoj, nek la originalaj desegnoj de Marzanti, nek tiuj de Matthew, tre plaĉas al mi. Ili malkongruas kun detaloj de la fizika konstruo de Pinokjo (Ili neniel indikas la rigidecon de ligna marioneto, nek rimarkinde diferencas de la aspekto de la homoj en la ilustraĵoj...), kaj al miaj okuloj ne indikas deseg nolertecon. Sed sendube la desegnostiloj de 1883 diferencas de la nunaj, kaj siatempe troviĝis allogaj.

Se vi ne jam havas la eldonon de 1981, kun la traduko farita de Marchesi, vi trovos tiun de 2003 kun la traduko farita de Horvath havinda por viaj esperantonkomprenantaj infanoj. Se vi jam havas la eldonon de 1981, vi nenion gajnos per akiro de la nova Horvath-eldono. □

1. Atentodeficitita hiperaktiv-diagnozitulo, infano suferanta pro psikiatria malsano pro kiu ne eblas normale atentadi, nek resti kvietata.

Fjodor Dostojevskij: Blankaj noktoj. Tr. el la rusa lingvo Aleksander Korĵenkov, Grigorij Arosev, Aleksej Birjuln. Kaliningrad: Sezonoj, 2002. 448 paĝoj. Bindita.

Takso: 

Temas pri 6 romanoj kaj noveloj verkitaĵoj de majstra klasika rusa verkisto: *Malriĉaj homoj*, *Sozio*¹, *Honesta ŝtelisto*, *Blankaj noktoj*, *Misfortuna historio*, *Noticoj el la kelo*.

Ĉu mi aŭdacas konfesi ke antaŭ nun mi neniam legis verkaĵon de Dostojevskij? Sendube tio faras el mi veran filistron. Kial mi ne legis? Nu, jam en infanaĝo mi renkontiĝis kun Tolstoj (kiu tedegis min per sia vortabundado kaj helikrapida rakontado). Amasego da nomoj, preskaŭ ĉiufoje persono menciita sur unu paĝo prezentigas sub alia nomo sur sekva paĝo, kaj ankoraŭ alia nomo alipaĝe; ĉu tiuj rusoj tute ne kapablas simple nomi sin? Ĉu iu anglalingva persono iam sukcesis vere tralegi la tutan *Milito kaj Paco*-n? Nu, Dostojevskij estas alia fama klasika rusverkisto. Kaj li vivis antaŭ longege (1821-1881). Do kial riski la leĝon?

Tamen, antaŭ kelkaj monatoj mi legis por recenzo la romanon de Gogol, *Malvivaj animoj*, kiu — malgraŭ iom da perplekso pro rusaj kutimoj ne konataj de mi — montriĝis ne nur plejparte interesa, sed havis nekredoblan intrigon kian inde povus verki P. G. Wodehouse, aŭ eĉ siamaniere Graham Greene. Do evidente ne ĉiu rusa klasikverkisto estas tro teda.

1. Sozio estas persono identa kun alia persono aspekte, aĝe, mense, emocie, eĉ per sia nomo... En la realo sozio ne povas ekzisti. Sed en romano, nu jen alia afero. —



Do, kiam Sezonoj demandis al mi ĉu mi akceptus recenzi ĉi tiun volumon de Dostojevskij, mi akceptis. Ĉu malindan libron iam eldonis Sezonoj? Mi dubas ke tio povus okazi.

Efektive, ĉi dostojevskija libro estas trezoro! Nenia tedo, multegaj surprizoj, multe da humuro, maleblaj intrigoj kiujn oni volonte imagas eblaj por povi ĝui la imagemon de la verkisto. Kaj, malsimile al la verkoj de multaj aliaj famaj verkistoj, ĉiu el la romanoj/noveloj neniel similas al alia.

La novelo *Blankaj noktoj* (la kvara verko en la volumo) priskribas kvar sinsekvajn noktojn kaj unu matenon. Enestas du personoj (kaj kelkaj iomete priskribitaj "ekstruloj"): viro (sennama), kaj junulino nomata Nastenjka. Unu nokton je la deka horo la viro savas Nastenjkan, kiun minacis ebrulo. Ŝi estas alloga, evidente tre perturbata persono bezonanta konsolon. Ili interparolas, kaj planas rerenkontiĝi la postan nokton samhore. Kaj simile trian kaj kvaran noktojn. Montriĝas ke Nastenjka atendas la promesitan revenon de amato, kiu tamen ne revenas. Ŝi dum la kvar noktoj ŝajnas ekami nian sennomulon, kaj li ŝin. Sed ve, lastamminute alvenas la mankinta amato, kaj nia sennomulo lasiĝas kun nur memoroj.

Sozio prezentas al ni oficiston, kiu subite vidas identulon, kaj la identulo iom post iom maskeras kiel nia heroo, estas iom post iom akceptata de la mondo kvazaŭ li estus nia aŭtentika heroo — okazas multaj humuraj epizodoj, kaj la neatendita kulmino de la romano estas egale nekredobla kiel surpriza. Majstra romano.

Malriĉaj homoj estis la unua eldonita verko de Dostojevskij kaj lin famigis. Temas pri serio de leteroj inter mal-

junulo malriĉa kaj najbara malriĉulino kiu eble jes aŭ eble ne estas parenco. Kvankam ili kelkfoje interrenkontiĝas, ni legas pri tio nur per iliaj leteroj. Estas kvazaŭ ni ektrovas ĝis tiam nekoni-tan arkivon de korespondaĵoj, kaj devas imagi la interleterajn eventojn.

Ni informiĝas ĝisfunde pri la vivo de malriĉuloj en la tiama Ruslando; krome la sprita enhavo kaj kelkfoje spirraba priskribo devigas nin senĉese legadi.

La aliaj verkoj en la volumo simil- e prezentas al ni strangamaniere rakont- ojn tragedi-humor-ajn, kaj riĉe pri- skribas por ni homojn kies karakteroj estas duarigarde ŝoke nekredablaj, sed duarigarde ŝoke realismaj.

La tradukoj estas malkritikinde bonaj — tre zorge faritaj kaj gramatike

kaj vortuze modelaj. Komposteraroj malfacile troveblas. Granda nombro da postnotoj klarigas aludojn en la rakont- ojn.

Resume: seriozliteratura volumo por la sperta kaj lerta leganto kiu deziras eduki sin per ĉi tiu parto de la kremo de la rusa literaturo. □

Libro ricevita

Lee Chong-Yewong, komp.: *Esperanto kaj internaciaj organizaĵoj*. UEA: Rotterdam, 2003. 18p.

Malgranda nombro da esperantaj tradukoj de rezolucioj prezentitaj al diversaj internaciaj organizaĵoj. Prezentas la tekston de diversaj gravaj rezolucioj, akceptitaj kaj neakceptitaj, precipe ĉe LdeN kaj UN. □

Ĉu vi ricevis difektan ekzempleron?

Pro paneo de la presmaŝino en la presejo, kelkaj ekzempleroj de *EPK* 63 (Majo-Junio 2003) estis difektaj. Se vi ricevis ekzempleron en kiu mankis paĝoj, bonvolu atentigi nian dissendiston: Margaret Inglis, 4 Mayfield Drive, Mt Waverley Vic 3149 (retadreso: minglis@netspace.net.au), kaj ŝi sendos al vi nedifektan ekzempleron. Sendifekta ekzemplero havas ĉiujn 32 paĝojn.

AEA-NZEA Kongreso 2004

La venonta AEA-NZEA Kongreso okazos en Kvinlando ĉe Margate Conference Centre, Redcliffe. Tiu regiono estas tre agrabla marborda loko, 30 kilometrojn norde de Brisbano. La konferencejo havas dulitajn ĉambrojn kun banejo; kaj ankaŭ estas grupdormejoj. La tuta kosto por la semajno estos proksimume \$332 por ĉiu persono en dulita ĉambro, kaj \$302 por ĉiu en la grupdormejoj. Estos speciala prezo por familioj.

La datoj estos: la 19a ĝis la 25a de januaro 2004.

La aliĝiloj estos senditaj kun la septembro/oktobra numero de *EPK*.

Intertempe, se vi opinias ke vi ĉeestos, bonvole sendi mesaĝon al June Perkins, kies retadreso estas ronjuneperkins@powerup.com.au

Se vi preferas, skribu, telefonu aŭ faksu al mi.

Adreso: Kay Andersen, PO Box 186, Moorooka Qld 4105. Telefono/Fakso: 07 3848 4428

Necesas scii antaŭ la fino de septembro ĉu ni havos almenaŭ 40 partoprenantojn. La konferencejo insistas ke tiu nombro ĉeestu, alie ni devos malmendi. Do, ne forgesu informi nin, mi petas.

Kay Andersen, membro de la Loka Kongresa Komitato.

Karuselo en formo kaj koloro

de Franciska Toubale

Kio kaŝas sin sub tiu ĉarmoplena titolo? Pentraĵaro, ekspoziciita de melburna esperantistino, Alida Leereveld, en la galerio de la magistrato de Glen Iris de la 3a ĝis la 15a de junio 2003.

La apartaj flavverdaj kaj brunaj koloroj de centoj da pentraĵoj, la ceramikaĵoj kaj la portretoj kies trajtojn reliefigas nigraj linioj aŭ kiuj rigardas al la rigardanto per siaj blankaj okuloj, regas la publikon. Multaj memorigas pri la filozofio de la impresionisma skolo: kapti apartan momenton de la vivo.

Por dividi tiun emocian sperton kun la legantoj de *ESK* kiuj ne havis oportunon ĉeesti tiun eventon, mi faris al Alida kelkajn demandojn:

Kiam vi ekinteresiĝis pri pentrarto? Ĉu en juna aĝo?

Jes, mi estis sufiĉe juna kiam mi ekinteresiĝis pri pentrarto, eble dekokjaraĝa. Sed tiam la mondo militis. Eblis nek aĉeti la materialon por pentri nek trovi iun, kiu povus instrui tion al mi. Mia nura kapablo estis sin vivteni. Mi havis oportunon komenci trejnadon poste, post mia edziniĝo en 1944. Kiam ni migris al Aŭstralio en 1952, mi ricevis permeson aliĝi al la kolegio por instruistoj pri arto de la meza lerneja nivelo en Hobarto, kaj lernis sub la gvidado de Archibald-premiito Jack Carrington Smith. Mi daŭrigis mian studon en Melburno en la Artgaleria lernejo ankaŭ kun Archibald-premiito, John Brack.

Ĉu necesas unue imiti la majstrojn por poste trovi sian propran stilon?



En ĉiu lernejo la majstroj de la komenco ĝis la moderna epoko fariĝas studobjektoj, sed personan stilon oni jam havas senkonscie. Ĉiu influo, ĉiu sperto kontribuas al ĝia evoluo.

Ĉu vi povas priskribi la naskiĝon de pentraĵo?

Fakte ĝi similas la naskiĝon de homo. Unue estas semo kaj ĝi disvolviĝas. Same kiel ne eblas momente ĉesigi gravetemon pro pli urĝa afero, same la pentraĵo devas kreski seninterrompe. Pro tio necesas havi longan liberan tempon, kelkajn tagojn antaŭ si.

Do ne estis facile por vi samtempe zorgi pri via familio kaj pentri?

Kiam la infanoj komencis iri al la lernejo, mi havis la tutan tagon libera. Tio donis al mi sufiĉe da tempo. Sed kiam la genepoj alvenis, mi prefere faris ceramikaĵojn, kiuj ne postulas tiom longan koncentriĝon kaj kiujn oni povas forlasi kaj repreni.

Kia estas via kontakto kun la publiko, ĉu gravas al vi havi rigardantojn?

Se homoj rigardas viajn artaĵojn, ili ankaŭ kritikis. Tio ĝenas min, ĉar mi

deziras ke mia pentraĵo respregulu miajn verajn sentojn, ke ili estu puraj. Pro tio mi neniam antaŭe ekspoziciis miajn verkojn. Sed nun mi ne plu timas la influon de la kritikoj.

Mi tre ĝojas ke alvenis tiu tempo kiam vi decidis konatigi al la publiko viajn artaĵojn kaj kore dankas vin pro la plezuro kiun vi donacis al ni. □

La Novzelanda kongreso

de Franciska Toubale

Dum Pasko de la 18a de aprilo ĝis la 21a, la kongreso de Novzelanda Esperanto-Asocio, organizita ĉijare de la grupo en Christchurch, okazis en impona loko: la Centro pri Artoj. Kelkaj esperantistoj studis en tiu britstila konstruaĵo, tiam Universitato de Christchurch. Ĝi situas en la centro de la urbo, apud tre fama botanika ĝardeno. Multaj artistoj nun laboras tie kaj ekspozicias siajn artaĵojn. Ne mankas kafejoj, restoracioj, muzikhalo, kinejo aŭ teatrojo. Je la semajnfino aperas budoj en la internaj kortoj, de kie eblas aĉeti, interalie, manĝaĵojn de diversaj partoj de la mondo.

Ĉeestis la kongreson dudek homoj. Kvin el ili estas eksterlandanoj: Julie Regal de Usono, Yoshinaga Tomoko de Japano, kaj tri aŭstralianoj: Betty Batt, Sandor Monostori, kaj mi mem. Pro tio fariĝis la etoso internacia, kiel decas por Esperanta aranĝo.

Debato pri la kongrestemo "Ĝuu Esperanton" ekis la eventon. Logike sekvis konkreta aplikado per finaranĝo de la programo, en kiu preskaŭ ĉiu partoprenanto proponis iun eron. Ĝi konsistis el kursoj en la mateno: la spertuloj tradukis humuraĵojn, dum la cetero partoprenis en paroliga kurso.



Dum tepaŭzo

En la posttagmezo prelegantoj informis la aŭskultantaron pri la TTT-paĝoj en la reto, pri Esperanto-libroj, pri la historio de Akaroa (marborda urbeto de la duoninsulo Banks, kiun atingis francoj en 1840 kaj celo de la lunda ekskurso), pri originala viro de Christchurch, Alexander Bickerton.

Tiu profesoro pri kemio en Universitato de Christchurch perdis sian postenon pro siaj avangardaj ideoj. Li deziris fondi komunumon de cent personoj kiuj kune ŝparus monon kaj tempon kaj harmonie kaj ĝoje vivus for de kapitalismo kaj geedzeco. Bedaŭrinde li ne sukcesis allogi sufiĉe da homoj kaj rezignis. Poste li fariĝis esperantisto kaj ĉeestis la kongreson kiu okazis dum universala ekspozicio.

Oni ankaŭ spektis vibendojn pri la

kongreso en Montpellier kaj pri ĝoja kaj vigla junulara kongreso en Brazilo.



Howard Gravatt elsendas televidan programon

Je la lasta tago la du grupoj prezentis unu al la alia amuzajn kantojn kaj skeĉon, kreitajn dum la kurso, kaj amuzan paroladon, pri la ŝanĝoj en la sansistemo favore al la kuracistoj.

En la vespero okazis la jarkunvenoj en malstreĉita etoso. La asocio suferas pro la sama problemoj kiel en aliaj



Dave Dewar kaj Erin McGifford: Grava decido!

landoj: la malkresko de la membroj. La Pacifika Komisiono por kiu kunlaboras aŭstralianoj ne estas tiom vigla. Tamen restas la espero ke iu indigenino povos partopreni "Indiĝenaj Dialogoj"-n.

Kie okazos la venonta kongreso? Ĝi estos komuna al Aŭstralio kaj Novzelando, laŭ la tradicio. Ni atendu informojn pri tiu evento.

Mi dankas Novzelandan Esperanto-Asocion, kiu invitis min kaj ebligis min renkonti ĝis tiam nekonatajn samideanojn, kaj malkovri iom de tiu bela insulo. □



POR RIDIGI VIN



Kinkas demandas al s-ro Manuelo:

"Patro, kion signifas la vorto 'alternativo'?"

"Imagu, ke vi jam estas plenaĝulo kaj volas zorgi pri ia negoco. Iam vi decidis aĉeti kokinon. Ĝi kovas ovojn. Poste vi havas multe, multe da kokinoj. Vi estas riĉa, vi havas kokinkulturon, aŭtomobilojn, ĉevalojn..."

"Sed patro, mi volas scii nur, kio estas 'alternativo'..."

"Jes mia filo. Ĝuste tion mi estas eksplikanta al vi! Do, vi estas riĉa homo, sed iun tagon okazas grandega inundo kiu detruas vian bienon. Vi perdas ĉion kaj la kokinoj mortas, ĉar la stultuloj ne scias naĝi."

"Tiam patro, kaj la alternativo, ĉu?"

"La alternativo, mia filo, estas anasoj!"

[El Eventoj]

Instruisto: Kio okazis al via hejmtasko?
Lernanto: Mi faris el ĝi paperflugmaŝinon, kaj iu pirate ŝtelis ĝin.


[el Tamen Plu]

Mia rondiro en la suda insulo de Novzelando

de Franciska Toubale

Anstataŭ reiri hejmen tuj post la fino de la kongreso, mi preferis preni la oportunon iom malkovri la landon, kiun mi vizitis la unuan fojon.

Kvankam iom pluvis kaj malvarmis dum la kongreso, kiam mi trafis la trajnon por iri de Christchurch al Greymouth, laŭdire unu el la plej pitoreskaj veturadoj en la mondo, la blua ĉielo kaj bela suno reliefigis la kontraston inter la neĝokovritaj pintoj de la Alpoj kaj la verda ebena de Canterbury.



Ĉe Pasejo de Arturo

Mi haltis mezvoje ĉe Pasejo de Arturo (Arthur's Pass), kie dum du tagoj mi piedmigradis en la montaro, tra fagoarbaro, kie la musko estas nekredeble dika, aŭ marĉo, aŭ laŭ ŝtonaj kru-taj vojoj depende de la orientiĝo de la flanko de la monto, admirante la valojn, la akvofalojn, la indiĝenajn plantojn. La ĉokolado de Vilĉjo redonis al mi forton kiam necesis.



Franciska Toubale ĉe Glaĉero Franz Joseph

Menciindas ligna kapelo en la mezo de la vilaĝo. Unu el la muroj estas el vitro, tiel ke akvofalo fariĝas ĝia nura ornamaĵo. Mi neniam vidis tiom da harmonio inter beleco kaj simpleco.

Mia dua etapo estis Glaĉero Franz Josef. Kia surprizo trovi ĝin tute apud plugarbaro! Mi aliĝis al grupo kiu, ekipite per krampoj kaj pioĉeto, sub la gvidado de spertulo ĝin esploris. Dum tuta tago ni surgrimpis kaj malgrimpis la bluan glacieron laŭ fendegoj kaj kavoj. Ni devis iri kiel pingvenoj, kun la piedoj iom for unu de la alia, premante la plandojn en la glacieron. Foje la gvidisto fosis ŝtupojn, kiam la tereno estis tro kruta. Foje li faligis la supron de kavo, kiam la glacio ne estis sufiĉe solida, ĉar bedaŭrinde tiu glaciejo rapide ŝrumpas. Ĉu alia pruvo de la varmiĝo de la tero?

Mi ne iris pli suden ol Wanaka, urbo apud granda lago ĉirkaŭita de montoj.

La aŭtunaj koloroj de la eŭropaj arboj emfazis la belecon de la pejzaĝo. Post penega grimrado ĝis la supro de monto Iron, eblas malkovri la du lagojn samtempe: Wanaka kaj Hawea. Wanaka estas taŭga loko por sportemuloj.

Sed esperantistoj atendis min en Christchurch, por kune pasigi mian lastan tagon en ilia lando, do mi atingis tiun urbon per la plej rapida vojo ĉe la orienta flanko de la insulo. Tamen mi havis la ŝancon admiri monton Cook tra la fenestro de la buso.



Franciska Toubale, Erin, Dave Dewar
ĉe Hanmer Springs

Dave kaj Erin veturigis min norde de Christchurch ĝis Hanmer Springs, bona loko por malstreĉiĝi en basenoj, kie la temperaturo de la akvo ŝanĝiĝas de 37°C ĝis 45°C. Estas facile alkutimiĝi eĉ al la plej alta temperaturo, se oni sekvas la ordon de la basenoj. Dum oni ĝuas la komforton de la varma akvo, rigardo supren al la blanka pinto de la montaro fortigas la senton de bonstato.

Mi ne forlasis Christchurch-on sen viziti, kune kun Erin, la skulptaĵon faritan honore al la virinoj kiuj klopodis por ke la novzelandanoj, la unuaj en la tuta mondo, ricevu la rajton voĉ-

doni same kiel la viroj. Erin estis membro de la komitato kiu konceptis tiun monumenton. Neniu povus pli bone ol ŝi klarigi ĉiujn detalojn.

Tiu mallonga vojaĝo donis al mi la emon iam reiri al Novzelando kaj pli profunde esplori la landon. Ĉu mi tiam vidos la famajn nestorojn (Nestor notabilis) aŭ nur la afiŝojn kiuj avertas vin ke vi ne devas nutri ilin? □



POR RIDIGI VIN



Postvivis ŝipruiniĝon viro, ŝafo kaj hundo. Ili nun trovis sin sur neloĝata insulo. Ĉi-un vesperon ili iris al la marbordo, kie ili rigardis la sunsubiron. Iun vesperon la ĉielo ruĝis ornamite de belegaj cirusoĵ. Blovis varmeta venteto, kaj la vespero invitis al amindumado.

La ŝafo — ĉu pro la belega vespero — aspektis pli kaj pli ĉarma kaj alloga al la viro, kaj li ĉirkaŭbrakis ĝian gracion korpon.

Bedaŭrinde por la viro, la hundo ĵaluze grumblis. Timis la viro kaj forprenis sian brakon.


Post tiu okazaĵo la trio kune ĝuadis la sunsubirojn, sed ne plu okazis brakumadoj. Pasis du semajnoj, kaj jen, okazis alia ŝipruiniĝo. La ununura postvivanto estis juna belulino, la plej belega, kiun la viro iam ajn en sia vivo vidis!

Ŝi estis multon suferinta, kaj la trio flegis ŝin ĝis resaniĝo. Venis la tempo por ke ankaŭ la virino vidu la sunsubiron.

Estis belega vespero, ruĝa ĉielo, cirusoĵ, varmeta venteto, perfekta vespero por amindumado.

Tre baldaŭ la viro ekhavis "tiujn sentojn". Li kontraŭstaris kiel eble plej longe, sed finfine li cedis, alproksimiĝis al la junulino kaj flustris en ŝian oreilon: "Ĉu vi volas promeni iomete kun la hundo?"

[el *Tamen Plu*]



• **En Scienca kaj Teknika Esperanto-Biblioteko** ĉe www.eventoj.hu/steb aperis la ĵus finita listo Terminaroj 1980-2002. Ĝi estas bibliografio de terminaroj eldonitaj inter 1980 kaj 2002 inkluzive. Ĝi rezultas el enketo proponita de Renato Corsetti antaŭ proksimume unu jaro en la retlisto "terminologio-1" (nun "terminologio"). Ĝi entenas referencojn al precipe surpaperaj verkoj, ankaŭ al kelkaj retaj. La bibliografion verkis Jerome Vachey (rete: jvachey@free.fr). [fonto: ret-info]

• **Se vi uzas Windows**, eble interesos vin la senpaga programo *Copy-Writer*, kiu bone ebligas la esperantajn literojn per Tavultsoft. Ĝi estas relative simpla tekstprogramo kun multaj ne-atenditaj kapabloj. Ĝi ankaŭ kapablas legi Microsoft Word-dokumentojn.

• **Virtuala UK 2003 por nekongresanoj**: La ĉijara 88-a Universala Kongreso, okazonta en Gotenburgo, Svedio 26 julio-2 aŭgusto, funkciigos ankaŭ t.n. virtualan kongresejon, en kiu nekongresanoj povos sekvi la laborojn de la kongreso lege, bilde kaj aŭde. Tio estos la unua klopodo, tial pionira. Krom legi kaj aŭdi pri la diversaj aranĝoj, eblos sendi mesaĝojn al ĉiuj kongresanoj (ĉiu ricevos propran retadreson, kiu funkcios nur dum la kongresa semajno), pridiskuti la kongresan temon kaj aŭskulti eldirojn de kongresanoj. La virtuala kongresejo funkcios ĉe la adreso:

www.uk-2003.net.

• **www.lernu.net** estas utila retejo por personoj dezirantaj lerni Esperanton aŭ plibonigi sian scion de Esperanto. Ĝi enhavas tri kursojn (por komentantoj, por progresantoj, kaj por spertaj esperantistoj), ekzercojn, legaĵojn, vortarojn, kc.

La uzanto povas elekti tiun lingvon, en kiu ŝ/li deziras legi la instrukciojn kaj bazajn informojn pri Esperanto kaj pri la studaĵoj en la retejo.

Averto: La lingvuzo en la esperanta teksto de la retejo ne estas ĉiam klara, precipe la vortelekto estas ofte konfuzza. Do se vi elektos legi la retej-informojn en Esperanto, pretu cerbumadi kelkfoje pri la signifo de tiuj informoj.

• **Ciganoj**: la retpaĝaro RomNet publikigas siajn novaĵojn ankaŭ en Esperanto. RomNet estas retejo por romaaj (ciganaĵ) junuloj en Hungario. La Esperanto-versio de la paĝaro estas ekfarita ekde antaŭ ne longe. La retpaĝaro troviĝas ĉe: <http://www.romnet.hu>

• **Estas kreita diskutlisto por lesbaj, ambaŭseksemaj kaj transseksaj virinoj**, kiuj parolas en Esperanto. La grupo estas "virina spaco": Nur homoj kiuj identiĝas kiel inaj rajtas membri. Oni povas aliĝi sendante malplanan mesaĝon al: gejinoj-subscribe@yahoo.com

• **Reta reldono de grava esperantologia verko**: UEA okazigis

nur-elektronikan eldonon de ampleksa publikaĵo. Temas pri aktualigita *Bibliografio de vortaroj*, origine kompilita de Edward Ockey en 1982.

La bibliografia listo estis enkomputiligita kaj parte ĝisdatigita de Geoffrey Sutton, kaj sekve de tio ĝi ricevis novan titolon: *Bibliografio de vortaroj kaj terminaroj en Esperanto, 1887-2002*. En ĝi estas listigitaj Esperanto-vortaroj kaj terminaroj publikigitaj dum la tuta vivodaŭro de nia lingvo — entute 1079 titoloj. Sendube la listo ne estas kompleta, sed momente la plej plena. La Bibliografio estas trovebla ĉe la adreso <http://uea.org/dokumentoj/bibliografioj.html> kaj estas prezentita en tri

formatoj — HTML-versio, kiun oni povas konsulti rete, PDF-versio kaj RTF (arkivigita) kiujn oni povas elŝuti kaj konsulti laŭbezone en propraj komputiloj.

En la sama paĝo oni trovas apartan *Bibliografion de Esperanto-terminaroj aperintaj en 1980-2002*. Ĝi estas pli oportuna por tiuj, kiuj simple serĉas specifajn fakajn terminarojn, ĉar ĝi disponigas titolojn ofte reale troveblajn en libroservoj. Krome, post pluraj titoloj estas aldonitaj hiperligiloj, pere de kiuj oni povas transiri al la tekstoj de la terminaroj en diversaj Esperanto-retejoj. La bibliografio estis kompilita de Jerom Vashe kaj enretigita de Dirk Bindmann. □



Por Ridigi Vin



En la lasta leciono de la jaro, la lernantoj dankas al la instruistino per donacoj. La filo de mastro de Sukeraĵejo al ŝi donas skatoleton. Ŝi agitas la skatoleton:

“Ĉu en ĝi estas bombonoj?”

“Jes, instruistino!”

La filo de la mastro de Librejo donas pakaĵon al ŝi.

“Tiu estas peza. Mi trovas, ke ĝi estas libro...”

“Jes, instruistino!”

La filo de la mastro de Drinkejo donas al ŝi la donacon. Ŝi rimarkas, ke fluuetas de la pakaĵo eta kvanto da likvaĵo. Ŝi gustumas guton kaj hazardas:

“Ĉu vino?”

“Ne, instruistino!”

Ŝi gustumas pli unu guton.

“Ĉu likvoro?”

“Ankaŭ ne...”

“Mi ne sukcesas diveni! Kion vi donas al mi?”

Kaj la knabeto respondas:

“Novan hundineton.”

[El *Evento*]

Florence Fay Koppel

1912-2003

Fay Koppel naskiĝis Florence Fay Andres, la 10an de aŭgusto 1912 en Adelajdo. Ŝi havis unu fratinon, Gladys, kiu mortis en emeritejo en Adelajdo.

Fay sukcesis kun honoro dum sia studado en gimnazio, kaj volis studi instruadon en universitato, sed anstataŭe ŝi trovis ke estis necese labori kiel infanzorgistino en familio kun ses infanoj.

Post tio ŝi studis sekretariadon kaj laboris en la Hospitalo Adelajdo dum multaj jaroj. Ŝi ankaŭ studis Esperanton.

Fay renkontis Herbert Koppel-on, aŭstrian esperantiston, en Melburno dum Esperanto-kongreso malfrue en la 1940-oj. Ili geedziĝis la 10an de novembro en 1951

Dum multaj jaroj Fay laboris kiel sekretario en la Oficejo de la Registara Advokato. Herbet mortis en la Vartejo por Maljunaj Kolonianoj, la 23an de septembro 1999.

Fay estis inter la plej respektataj instruistoj de Esperanto en Aŭstralio.

Ŝi estis unu el la nur 8 sukcesintoj en la Norma Klereca Ekzameno de AEA.

Fay verkis du librojn en Esperanto. Inter ili: *De Z al A en tri epokoj*. Dum multaj jaroj ŝi estis membro de la Ekzamenkomitato de AEA, kaj ĝis novembro 1995 ŝi ankaŭ instruis Esperanton ĉe la Melburna Esperanto-Societo.

Fay fariĝis "Fratulo" de AEA en 1988.

Ŝi pace mortis en la Vartejo por Maljunaj Kolonianoj, la 10an de junio 2003.

[Biografeto verkita surbaze de informoj de la bofratino de Fay.]

Mi renkontis Fay Koppel-on en 1962, nur kelkajn semajnojn post la alveno de mi kaj mia edzino al Aŭstralio. Kune, ŝi kaj Herbet gvidis nin tra Melburno, konigis al ni la esperantistojn de Melburno, helpis nin trovi loĝejon, kaj ĝenerale trovi nin ĉeĥeje en ĉi tiu por ni tute nova lando. Poste, dum mi estis Ĉefekzamenisto por la ekzamenoj de AEA, mi trovis ŝin fidela kaj ĉiam sagaca ekzamenisto, kiu ofte donis al mi tre sekvindajn konsilojn. — ☞



Igor Sitnikov

Diversaĵoj

Naturista Vivo

estas kvaronjara malpornografia nudista revuo kun tekstoj kaj koloraj fotoj, 16-paĝa. Ĝi jam atingis 70 numerojn. Abono kostas €\$14 = proks. AŬS\$25, kaj estas alte rekomendata. Provekzempleron vi povas ricevi de la redakcio de *EN*, aŭ rekte de la eldonanto de Naturista Vivo: Németh József, Fő u. 41/5, HU-8531 Ihász, Hungario.

Fabelkonkurso por infanoj:

La finna Paatalo-Instituto, (hejmpaĝo ĉe: www.taivalkoski.fi/paatalo-instituutti) organizas fabelkonkurson en Esperanto por infanoj ĝis 13-jaraj (unuopuloj aŭ grupoj). La longeco de la verkoj ne estas fiksita.

La konkursaĵoj alvenu ĝis la 15-a de septembro 2003 ĉe: Paatalo-Instituto, Fabelkonkurso, PL 39, fi-93401 Taivalkoski, Finnlando.

Oni uzu pseŭdonimon kaj menciu ĉu temas pri unuopulo aŭ grupo. La vera nomo, adreso, naskiĝdato kaj (se eble) telefonnumero aŭ retadreso estu en alia koverto. [El *Ret-info*]

Edziniĝis Penny Vos

al Brad Pym en NSW, kaj tial ŝi nun ne plu loĝas en Okcidentaŭstralio. La geedziĝon ĉeestis ses geesperantistoj el Viktorio. Brad jam komencis lerni la Universalan Lingvon perkoresponde en 2002, kaj nun instruas lin Penny Pym!



POR RIDIGI
VIN



Zamenhof bone kuras!

Ĉevalo nomita Zamenhof gajnis, la 15-an de majo, la ĉefan kurkonkurson en Longchamp (Prix du Bois de Boulogne / Premio de la Bulonja arbareto), apud Parizo. La ĵokeo estis S. Pasquier. Laŭ informo de Marc Anselmi, sekretario de Arras Esperanto [fonto: *ret-info*]

Kuirregulo

Antaŭ sesdek jaroj mia patrino instruis min rilate al la unua regulo de kuirado. Tio estis: "Antaŭ ol komenci, metu la ingrediencojn sur la tablon." Kiel mi povis forgesi tiel simplan regulon? (Eble pro maljuneco, aŭ senileco?)

Antaŭ tri tagoj mi forgesis tiun regulon. Mi iris al butikoj por aĉeti saŭcon. Poste mi senŝeligis kaj tranĉis. Tiam mi malkovris ke mi ne havas alian ingrediencojn. Kion fari? Mi devos reiri al la butikoj!

Tie mi parolis kun virino kiu estis en la vico. Mi demandis al ŝi: "Kio estas la unua regulo de kuirado?"

Tuj, sen eĉ unu minuto por pensi, ŝi respondis: "Petu alian personon fari la kuiradon."

Nun, post sesdek jaroj, mi scias kial mia patrino instruis min pri la dua regulo de kuirado, ne pri la vera unua regulo. Ŝi estis tre lerta! Certe mi ĉiam estis malrapida lernanto! Kaj vi?

Kontribus Jennifer Jefferies

Ekzercadi la korpon, se oni ne jam faras tion profesie, estas necesa parto de sana vivo.

Ekzercadi la menson ankaŭ estas necesa parto de sana vivo. Unu maniero ekzercadi la menson (kaj por nejunuloj: resti mense junaj) estas studi Esperanton. Ne simple viziti la klubkunvenojn kaj ĝui la kompanion. Esperantlingve; tio estas nur plezurado kaj amuzado, kvankam ankaŭ tre bona por la sano.

Ne, por ekzerci la menson, necesas forte peni pli bone kompreni la lingvon (la gramatikon), lerni pli kaj pli da vortoj, kaj metode ekzerci sian parolkapablon, ne nur simple babilante, sed en la parolo praktikante malfacilajn kaj sencoriĉajn lingvokonstruojn.

Unu maniero por tiel valore ekzerci la menson estas devigi sin studi kaj prepari sin por ekzameno. Ne estu kontenta, ke vi jam posedas diplomon, sed plivalorigu vian vivon penante pretiĝi por pli malfacila ŝtupo de ekzameno. Krome, oni ne scias, ĉu iam en la estonteco vi bezoniĝos por helpe uzi vian lingvokapablon, eĉ instruante.

Do, por esti pli utila al la Esperantomovado, kaj por sane kaj kontentige ekzercadi vian menson, mi invitas vin prepari vin por unu el la ses ekzamenoj haveblaj en Aŭstralio: Baza, Elementa, Meza, Supera, Alta, kaj Klereca. Por pli da informoj, kontaktu min aŭ unu el la provincŝtataj ekzamenistoj en Sidenjo, Melburno, Brisbane, Adelajdo, aŭ Perto.

Marcel Leereveld
Komisiito por ekzamenoj
12 Heather Grove
Belgrave South Vic 3160

1. Kun la kunlaboro de aliaj esperantaj organizoj, Trish O'Connor de Esperanto-Ligo de Okcidenta Aŭstralio kunordigas esperantajn ekspoziciojn en publikaj bibliotekoj koincide kun la Internacia Tago de Paco je la 21a de septembro, 2003. Se via esperanta organizo dezirus partopreni ĉe siaj lokaj bibliotekoj, bonvolu sendi al Trish la adreson de la bibliotekoj, kaj Trish sendos plian informon al vi.

2. Ĉu plaĉus al vi kune helpi traduki en Esperanton "Security Council Resolution 1325 (Peace, Women & Security)"? Se jes, bonvolu kontakti Trish O'Connor-on kaj ŝi sendos ekzemplaron de la Rezolucio kun teksto por traduko.

Trish O'Connor
87 Contour Drive
Mullaloo WA 6027
Tel/Fax: (08) 9307 1964
Email: trish_o_connor@hotmail.com



POR RIDIGI VIN



"Mia kara, prezentu al vi: nia najbarino aĉetis la saman kostumon kiel mi!"

"Nu, kion nun ni faru: aĉetu al vi alian kostumon aŭ translokiĝu en alian domon?"

* * *

En la lernoĉambro, la instruistino pri Esperanto aŭdas "ĉu...ĉu...ĉu" funde de la klaso. Por silentigi ilin, ŝi postulas:

"Joĉjo, diru al mi du pronomojn!"

"Kiu? Mi?" li diras levigante.

"Tre bone! Vi povas sidiĝi."

[El Eventoj]

Koreo / Koreio?

En 1988 la Akademio de Esperanto faris decidojn pri la vortoj *Koreo* kaj *Egipto*. Tiuj decidoj estis unue publikigitaj en *La Letero de l' Akademio*, n-ro 7, Aprilo-Majo-Junio 1989, paĝoj 2 kaj sekvaj kaj poste en la "Oficiala Bulteno de la Akademio de Esperanto", No 11, *Aktoj de la Akademio III, 1975-1991*, paĝoj 61-63.

La Akademio tiam deklaris i.a. jene:

"La formo *Koreujo* estas kontraŭfundamenta. La sola formo, kiu obeas la Fundamenton estas *Koreo* kaj ties anoj estas *Koreanoj*. La sola formo, kiu obeas la Fundamenton estas la landnomo *Egipto*; ties anoj estas *Egiptanoj*."

La Akademio tiam referencis al la 15-a regulo de la "Fundamenta Gramatiko" kaj al la "2-a Rekomendo pri landnomoj" ("Oficialaj Informoj de la Akademio de Esperanto", n-ro 4, *Aktoj de la Akademio III*, pago 49), kiu tekstas jene:

"En okazo de konflikto inter du aŭ pluraj formoj por unu sama landnomo aŭ ankaŭ inter la uzo de unu kategorio aŭ la alia por unu sama radiko, la Akademio rekomendas preferi la plej internacian landnomon kaj tiel obei al la 15-a Regulo de la Fundamento."

Reveninte al tiuj demandoj la Akademio nun konstatas, ke la 15-a regulo de la "Fundamenta Gramatiko"¹ pritraktas, kiel

1. Neniu esperantlingva teksto de la "Fundamenta Gramatiko" ekzistis en la *Fundamento*. La angla versio tekstis:

15. The so-called "foreign words", i.e. words which the greater number of languages have derived from the same source, undergo no change in the International language, beyond conforming to its system of orthography. — Such is the rule with regard to primary words, derivatives are better formed (from the primary word) according to the rules of the international grammar, e.g. *teatr'o*, "theatre", but *teatr'a*, "theatrical", (not *teatrical'a*), etc. — ☐

"fremdaj" (internaciaj) vortoj kompletigu la vortoprovizon de Esperanto. La Akademio ankaŭ konstatas, ke per si mem tiu regulo ne determinas, kiu ano de internacia vortofamilio fariĝu baza en Esperanto, kaj kiun el la internaciaj signifoj ĝi havu. Tial uzado de la vortoj *Koreo* kaj *Egipto* kun genta aŭ landana signifo ne malobeas la 15-an regulon, same kiel tia uzado de ekzemple la vortoj *Ĉinio*, *Japano* kaj *Portugalo* tiun regulon ne malobeas, malgraŭ la fakto ke por ĉiu el ili la internacie plej ofta signifo estas landa.

Sekve la Akademio de Esperanto nun deklaras, ke neniu el la landnomoj *Koreo*, *Koreujo*, *Koreio*; *Egipto*, *Egiptujo*, *Egiptio* malobeas al la reguloj de la Fundamento de Esperanto. Per tio la Akademio nuligas siajn antaŭajn decidojn el 1988 pri la vortoj *Koreo* kaj *Egipto*.

La Direktoro de la Sekcio pri la Ĝenerala Vortaro Bertilo Wennergren,
La Prezidanto de la Akademio
Prof. Geraldo Mattos

Komento de via redaktoro:

Per ĉi tiu decido la Akademio oficialigas la ĥaosan staton jam de multaj jaroj ekzistantan en Esperanto.

Ĉu Koreo / koreano aŭ koreo / Koreio?

Ĉu Japano / japanano aŭ japano / Japanio? (Kun la ankaŭa ebleco de "Koreujo" kaj "Japanujo"?)

Legante inter la linioj, mi supozas ke la Akademio celas iam en la estonteco oficialigi la landanonomojn koreo kaj egipto, malgraŭ la deklaro de Zamenhof ke lia celo estis ke landoj ekster Eŭropo havu nomojn finiĝantajn per -o, kaj iliaj loĝantoj per -ano.

Por eviti konfuzon, ESK plu uzos la nomojn Koreo kaj Japanio kiel nomojn de landoj, kaj ni nomos ties anojn koreanoj kaj japanoj. ☐



From Our Readers



From Paul Desailly:

[Writing from China]

Anzac Day 2003

We hope that you can convey to the Esperantists of Australia our sense of gratitude to them for realizing Velanta's participation in the 19th Esperanto to Summer School. Unlike some previous scholarship winners she is persevering in her efforts to master the International Language and to promote its "inner idea" of world peace. I am confident she will be a successful ambassadress in Beijing 2004 (89th Universal Congress of Esperanto), and Kathmandu 2005 (4th Asian Congress of Esperanto), should we live so long, with SARS spreading so ominously.

We also want to extend a very special word of appreciation to that doyen of the Movement in our beloved country, Errol Chick, whose generosity has recently assisted in the publication of 500 professionally printed and bound copies of my book, *Making World Peace Real - The Bahai Faith and Esperanto*. Howard Perkins, who is one of Errol's good friends and himself an Esperantist living in Melbourne, is about to dispatch at great personal cost in time and money a free copy to nearly 200 National Bahai Centres throughout the world. You will be happy to hear that my work includes Ryan Morin's dictionary and a course on Esperanto kindly provided by Ken Rolls. *The Promise of World Peace*, from the pen of The Universal House of Justice, which I believe has been

rendered into Esperanto by you¹, is also included.

Three days ago two hysterical students here at Oriental University City came down with a temperature (not unusual in N.E. China in spring in this heavily polluted neck of the woods), and made enough noise to raise Lazarus again as they were assisted out of class and taken away by ambulance. And, the result was: 30,000 faculty members and students involuntarily and without compensation were laid off or went home to their families. That chaotic exodus was effected in one day. Now, if some of those kids actually have SARS it might be a quick way to spread it all over Old Cathay by sending them home in overcrowded trains to every part of the country. The dilemma facing the authorities is that keeping students in congested classes and dormitories might also be disastrous. Yesterday the mayor of Langfang announced that the tests for those two students mentioned show normal flu only. Meanwhile we are

(1) partially quarantined, (if we leave we may not return and deliveries are greatly curtailed). Update: We believe that Velanta has very recently become pregnant but we don't want medical confirmation in the Langfang hospital as it has become a SARS center since May 8th.

(2) without an income,

1. He means me. — ☐

(3) sequestered in the countryside half way between Beijing and Tianjin,

(4) with few employment prospects in mid-semester in a paranoid community that is imploding. To add salt to the wound I woke up with migraine headaches for several days after heated debates with the management over moneys withheld. Fluent English is at the command of so many business people the world over at the time of contract signing but a stilted tongue and Socratic irony seem to be their preferred weapons when it's time to sign cheques and honour promises. It's not always easy to understand the ways of the Lord; "He doeth as He willeth and what recourse hath we?" The university authorities plan to break for a month now; we all hope that the warmer weather will destroy SARS. If so, the end result workwise will be two short terms and one full term. If that pans out to be the case our in-class presentations and promotion this year of Shi Jie Yu, Esperanto, may well reach about 1,000 tertiary students instead of the usual 600.

God bless you and please don't sneeze.

Paul and Velanta Desailly.

P.S. Australia and New Zealand are probably the only countries to commemorate as a public holiday, each year on 25th April, an horrendous military defeat and our nations' baptism of fire in the hope that war will end forever. Exactly 30 years later on 25-4-1945, on the other side of the Pacific at San Francisco, the U.N. was born after the shedding of even more blood. The 25th of April marks a day of religious importance for Bahais known as the 5th day of Ridvan (Paradise). □

La 1a mondkongreso de Rotario de Steve Pitney



La Esperanto-budo ĉe la Rotarikongreso

De la 1a ĝis la 4a de junio 2003, okazis en Brisbano la jara mondkunveno de la servada organizo Rotary International.

Preskaŭ 17000 homoj el 120 landoj kunvenis dum la periodo kaj interparolis uzante la ses oficialajn lingvojn, kvankam plejparte la anglan.

En Rotario estas multaj diversaj amikaraj grupoj, ekzemple, golf-ludantoj, ŝakludantoj, ktp. La plej malnova el ili estas la Rotaria Amikaro de Esperantistoj (RADE) fondita en 1928.

La plejparto de la amikaraj grupoj havis informadajn budojn en la granda ekspoziciejo, kaj ankaŭ la RADE-grupo havis budon kie ni elmontris standardojn, multajn informaĵojn, librojn, ktp.

Kaj RADE-anoj kaj lokaj esperantistoj deĵoris dum la kvar tagoj.

La RADE-anoj estis Ursula kaj Giuseppe Grattapaglia el Brazilo, kaj Steve Pitney. La lokaj esperantistoj estis Kay Anderson, Hazel Green, Alan Grant, Jay Mooney, Margarita Pavlova, June Perkins kaj June Cullen.

Ni povis efektiviĝi bonan elmontron por Esperanto, tiel ke interesigis kelkaj homoj kiuj havas influon en la komunumo.

Kvankam multaj ne konsentis la bezonon por neŭtrala lingvo (plejparte Usonanoj kaj Aŭstralianoj), multaj aliaj konsentis, inkluzive kelkajn Brisbananojn kiuj espereble komencos lerni nian lingvon.

Je la lasta vespero, la plejparto de la Esperantistoj vespermanĝis ĉe restoracio kaj ni ankaŭ povis diskuti pri la aranĝoj por la venonta Kongreso en Januaro 2004 ĉe Margate en Brisbano.

Liro-2003

La redakcio de La Ondo de Esperanto denove invitas ĉiujn dezirantojn partopreni en tradicia literatura konkurso: Liro-2003.

Liro-2003 havas kvin branĉojn.

1. Originala prozo: ne pli ol 30 mil literojn longa
2. Originala poezio: la amplekso ne estas limigita
3. Traduka poezio el la rusa lingvo: poemoj de Fjodor Tjutĉev
4. Traduka prozo el la rusa lingvo: "Ĉelovek v futljare" de Anton Ĉeĥov
5. Traduka prozo el la angla lingvo: "The Celebrated Jumping Frog of Calaveras County" de Mark Twain

En ĉiu el la branĉoj 1, 2, 3 oni rajtas partopreni per ne pli ol tri verkoj.

Sendu tri tajpitajn, komputile kompostitajn aŭ tre klare skribitajn ekzemplerojn de la konkursaĵo al la sekretario de Liro-2003 (RU-236039

Kaliningrad, p. k. 1248, Ruslando). La konkursaĵoj devos atingi la organizantojn antaŭ la 1a de novembro 2003.

Subskribu vian konkursaĵon per pseŭdonimo kaj aldonu slipon kun indiko de la pseŭdonimo, aŭtenta nomo kaj poŝta adreso. Oni ne rajtas sendi verkojn, kiuj jam estis publikigitaj aŭ premiitaj en aliaj konkursoj.

La originalajn tekstojn de la tradukendaj verkoj petu ĉe la sekretario poŝte kontraŭ afrankita koverto (por Ruslando) aŭ internacia respondkuponon, aŭ rete (sezonoj@gazinter.net). Ili estas ankaŭ elŝuteblaj el nia retpaĝo [http:// Esperanto.Org/Ondo](http://Esperanto.Org/Ondo), rubriko "Literatura konkurso Liro", kie estas multaj informoj pri antaŭaj konkursoj.

La laŭreatoj de Liro-2003 ricevos diplomojn kaj libropremiojn. La rezulto estos anoncita je la Zamenhofa Tago 2003.

La organizantoj rezervas al si la rajton ĝis la 31a de decembro 2005 publikigi la ricevitajn konkursaĵojn en

La Ondo de Esperanto,
libroforme kaj elektronike. □



**POR RIDIGI
VIN**



La instruistino pri matematiko montras paperfolion kaj demandas Joĉjon:

"Se mi dividos ĉi tiun paperfolion je kvar pecoj, kun kiu frakcio mi restas?"

"Kvar kvaronoj, instruistino!"

"Kaj, se mi dividos laŭ ok pecoj?"

"Ok okonoj, instruistino!"









"Ĉu dividita por fari cent pecojn?"

"Pecigitaj paperoj, instruistino!"

[El *Eventoj*]

For the Beginner

Below are 36 pictures, and in a list beside them are 36 names which have been arranged alphabetically. Can you match up each name with its corresponding picture? The answers are on page 29, but before you run to a dictionary, and before you check yourself on whether you are getting the answers right or wrong, try to match up as many names and pictures as you possibly can. Guess, if you are unsure.



amboso
 ananaso
 anaso
 astro
 banano
 boltilo
 boto
 cerbo
 citrono
 delfeno
 diamanto
 fromaĝo
 gruo
 kastoro
 kruro
 kubuto
 lumturo
 maleolo
 mamoo
 neĝdomo
 pano
 papago
 pulmoj
 ripoj
 sacerdoto
 sonforko
 ŝafo
 ŝipo
 ŝraŭbo
 ŝtrumpeto
 teleskopo Hubble
 testudo
 tomato
 trombono
 trulo
 ventmuelilo



12



13




14



15



16



17



18



19



20



21



22



23



24









25



26

amboso
ananaso
anaso
astro
banano
boltilo
boto
cerbo
citrono
delfeno
diamanto
fromaĝo
gruo
kastoro
kruro
kubuto
lumturo
maleolo
mamo
neĝdomo
pano
papago
pulmoj
ripoj
sacerdoto
sonforko
ŝafo
ŝipo
ŝraŭbo
ŝtrumpeto
teleskopo Hub-
ble
testudo
tomato
trombono
trulo
ventmuelilo



amboso
ananaso
anaso
astro
banano
boltilo
boto
cerbo
citrono
delfeno
diamanto
fromaĝo
gruo
kastoro
kruro
kubuto
lumturo
maleolo
mamo
neĝdomo
pano
papago
pulmoj
ripoj
sacerdoto
sonforko
ŝafo
ŝipo
ŝraŭbo
ŝtrumpeto
teleskopo Hubble
testudo
tomato
trombono
trulo
ventmuelilo

When to use the word *si*?

English speakers have particular difficulty with using the Esperanto word *si*, because we simply have nothing corresponding to it in English. Textbooks often mislead us by introducing the word “self” as a sort of equivalent: *Li aĉetis novan ĉemizon por si* = “He bought a new shirt for himself”. That is fine as far as it goes. Unfortunately it does not go very far. However, let’s give it a look in:

“Whoever ends up representing us at the meeting, they should be sure to take our petition with them.” = *Negrave kiu eventuale reprezentos nin en la kunveno, tiu nepre kunprenu nian petskribon kun si*. — Literally the Esperanto reads: “regardless-of who as-it-happens (*eventuale*) represents us in the meeting, that-person absolutely-must (*nepre*) take-with our petition with self (*si*).

In English we usually have to decide between “him” or “her” or “them” as the last word in that sentence, and most of us decide to use “them” as a kind of universal solution as to which word to use. Esperanto, on the contrary, from the start has had the word *si* for such situations. That is its basic purpose: to avoid having to choose between he/him, she/her, they/them, it, when the person referred to has already been named in the sentence. Pay careful attention: *the person who is referred to must already have been named in the same sentence*.

The biggest problem comes up because of a grammatical technicality which exists in Esperanto but not in English. Look at these two sentences carefully:

Li kaj lia edzino venis al nia geedziĝo. = He and his wife came to our wedding.

Li kun sia edzino venis al nia geedziĝo. = He with his wife came to our wedding.

As English speakers we find it very hard to see why Esperanto uses *lia* in the first sentence but *sia* in the second sentence, when the meaning seems to be identical.

Esperanto grammarians explain it, rather mystically, this way: *Li kaj lia edzino* makes a grammatical unit, a sort of combination subject, and the words *si*, *sia*, and *sin* may **never** be part of the grammatical subject of a sentence. In the second sentence. *Li kun sia edzino* consists of a grammatical subject and a prepositional phrase. In a prepositional phrase, *kun lia edzino* would mean “with someone else’s wife, while *kun sia edzino* means “with his own wife”. (This is a summary of the explanation given by M. C. Butler in §839-841 of his *Step by Step in Esperanto*.)

Plena analiza gramatiko states more or less the same idea. It reads, in translation: “The question...comes up in regard to *sia*, which one might be inclined to use before a part of a complex subject in order to refer back to the other part: at such times one should use the direct possessive pronoun: *Petro kaj lia edzino tre amas miajn infanojn*... But one says *la mastro kun sia amiko promenis en la parko* (because *amiko* is a supplement of the subject, and not itself a part-subject; cf. *la mastro kaj lia amiko promenis*...)” PAG §160 II.

If these explanations make sense to you, well and good. If, as to me, they seem totally meaningless, then simply take it that this peculiarity of the use of *si/sia* exists. Very few Esperantists appear to be able to apply it systematically. — ☞

Kongreso 2003 en Christchurch Nov-Zelando

Temo: Ĝuu Esperanton
Raportas Donald Rogers kaj Ross Moore

Raporto pri la kongreso ĉe la Artejo (Arts Centre):

Je 10:00 je la 18-a de aprilo 2003, *David Dewar* bonvenigis la ĉestantojn al la kongreso nome de la Loka Kongresa Komitato. Li dankis al Frank Swift pro la horloĝoj kiujn oni donacis al la kongresanoj, eble por kuragi ilin veni akurate al la kongresaj sesioj! David anoncis pri la aranĝoj kaj diris ke la kongreso estas anoncita en la loka tagjurnalo. Bradley McDonald (prezidanto de NZEA) oficiale malfermis la 77an kongreson de la Asocio. Li rimarkis ke “Esperanto floras kiam diversaj kulturoj kunmiksiĝas”.

Franciska Toubale, gastinstruisto el Aŭstralio, diris ke ĉi tiu estas ŝia unua vizito al Nov-Zelando. Ŝi klarigis pri la ekspozicio de poŝtmarkoj kaj poŝtstampoj. Ĝi estis originale franclingva, kaj oni tradukis ĝin en Esperanton kaj poste en la anglan. Temas pri poŝtmarkoj pri internaciaj lingvoj, Esperanto, Zamenhof, simpatiantoj, kontraŭuloj, kongresoj, zamenhofaj memoraĵoj, ktp.

Bradley klarigis ke ĉi-kongrese la programo similas al tiu de la aŭstralia, kun lingvaj sesioj matene, paroligaj posttagmeze, kaj formalaj kunvenoj vespere. La celo estas pli da okazoj por praktiki la lingvon.

Ĝuu Esperanton

Je 11:00 Bradley enkondukis sesion pri la kongresa temo “Ĝuu Esperanton”. Li

deziris ke ĉiuj kontribuu al la diskuto.

Vilĉjo Wyber demandis ĉu Bradley spertis malfacilaĵojn kompreni esperantistojn en Nepalo pro malsama prononcado. Bradley respondis ke ne. La junulo kiu gvidis lin tie estis tre sperta parolanto.

Frank rimarkis ke la prononcado de anglaj vortoj varias eĉ en Anglujo, sen menciigi Usono kaj aliloke. Foje li tute ne komprenas ilin. Eble post cent jaroj la angla estos tiom ŝanĝita ke oni ne komprenos aliajn variantojn.

Ross Moore diris ke la junularo de la mondo devas ĝui Esperanton por ke la lingvo daŭru. En la 2002a Internacia Junulara Kongreso en Brazilo, kiun li partoprenis kiel TEJO-patrono, multaj junuloj tre ĝuis Esperanton. Ĝi kongruas kun ilia vivmaniero. En Pato Branco oni lernas Esperanton en lernejoj kaj uzas la lingvon sufiĉe ofte en la ĉiutaga vivo, dum la ĝuado de agado, ekzemple dancado, muziko, teatro, sporto kaj aliaj distraĵoj.

Howard Gravatt komentis ke li ĝuas Esperanton “kiam lertuloj parolas klare”.

Gwenda Sutton parolis favore pri Pasporta Servo — ŝi ricevis kelkajn vizitantojn dum la jaro. Instrui Esperanton estas ĝue — ŝi helpas lernantojn en interretaj diskutejoj. Mondvasta kunveno de esperantistoj okazas je la kvara mardo de ĉiu monato je 19:00.

Brian Fox opinias ke Esperanto jam

sukcesas ĉar oni nun povas uzi ĝin por kontakti alilingvanojn. Ne necesas fina venko por ĝui ĝin.

David esperas ke ni aĉetas kaj ĝuas esperantajn librojn. Verkoj estas haveblaj ankaŭ per la reto.

Franciska parolis pri la esperantaj radiaj elsendoj de stacio 3ZZZ en Melbourne. Per la interreto eblas aŭskulti ilin alilande (lunde je 15:00 en NZ). Ross aldonis ke ekzistas ankaŭ junulara ĉiutaga muzika stacio, kiun iu ajn povas aŭskulti per Interreto:

www.esperanto-radio.com

Franciska diris ke Esperanto estas pli ĝuinda kiam nedeviga, libera afero, ankaŭ en lernejoj. Multaj kritikistoj de Esperanto scias preskaŭ nenion pri ĝi. Pensu pozitive, kiel Emile Coué. Neni- am diru "ne".

Brian: ne interrompu lernantojn. Ili ĝuos kaj lernos pli efike per praktikado.

Bradley: Esperanto estas "alternativa lingvo".

Kunveno pri UEA

Je 14:10 okazis kunveno de la delegitoj de UEA. Ĉefdelegito David gvidis ĝin. Li petis ke delegitoj sciigu lin pri ŝanĝoj al siaj informoj por la Jarlibro de UEA. Li povas amendi ĝin per Interreto. Ross estis nia reprezentanto dum la lastjara Universala Kongreso en Fortaleza, Brazilo. Li ĉeestis la komitatkunsidojn kaj rimarkis ke kelkaj komitatanoj malŝparis multan tempon disputante pri flankaj aferoj. La malakordo inter porspiritistoj kaj kontraŭ-spiritistoj en Brazilo ankaŭ ĝenis lin. Se la movado ne povas toleri diversecon interne, kial ni atendu pacon ekstere? Krom tiuj ĝenoj la UK estis tre ĝuiga kaj informiga kaj la gastamo de la brazilanoj estis neplibonigebla.

Bradley prezentis salutmesaĝon de Renato Corsetti, prezidanto de UEA.

Bradley diris ke la Estraro de UEA celas progresigi Esperanton en ĉiuj regionoj de la mondo. Ekzistas komisiono de UEA por Oceanio, kaj ni en NZ devas agi aparte en nia regiono.

Esperanto kaj la Tut-Tera Teksaĵo
Je 15:30 Donald parolis pri tio provante instigi diskutadon. Li citis el tre leginda artikolo de prof-o Luis Guillermo Restrepo Rivas, en Kolombio (*Esperanto* jan 2003, paĝo 11). "Esperanto venkos en la mondo, se ĝi venkos en Interreto... La reto povas ludi tre ekstremajn rolojn: la plej granda danĝero aŭ la plej granda helpanto." UEA pli kaj pli utiligas Interreton por provizi servojn al la membroj: mendi librojn, gazetojn, kontakti oficistojn, ktp. En novembro 2002 la revuo *Esperanto* eldonis artikolon de Li Shijun (membro de Akademio de Esperanto), kiu konsentis pri la graveco de Interreto. Li listigis 12 vojojn utiligi la reton, kaj oni povas aldoni pli al la listo, ekzemple videokonferenci. Citante artikolon de Stephen Bell (*Computer-world New Zealand*, 20 jan 2003) Donald avertis ke grandaj kompanioj provas muldi la komputilon en analogon de televido – por pasive spekti informon provizitan de "aŭtoritatoj". Rezistu la malklerigadon kaj utiligu la reton por kunlabori kun aliaj esperantistoj. Li ankaŭ petis la ĉeestantojn pripensi kiel plibonigi nian retejon por allogi pliajn vizitantojn.

Komitatkunsido

Post la vespermanĝo okazis la Komitatkunsido. Howard prezentis raporton pri la Aŭklanda Esperanto-Societo por 2002. Ĝi kunvenis ĉiun duan kaj kvaran merkredon en ĉiu monato krom en januaro. Ofte je la aliaj merkredoj grupeto renkontiĝis ĉe Bradley, ĉefe por instruado. La Societo aĉetis 25 ekzemplerojn de

la lernolibro *The Esperanto Teacher* de Mason Stuttard por eventuala vendo al interesigantoj pri Esperanto. Brian prezentis sian novan verkon *Esperanto Names of N.Z. Birds*. AES abonis la revuojn *Kontakto*, *Monato*, kaj *La Ondo de Esperanto*.

David raportis por la grupo en Christchurch. En aprilo 2002 Tereza Kapista, Jo Horton kaj aliaj vizitantoj el Aŭstralio kaj Japanio vizitis. La klubo havis kvar aliajn kunvenojn dum la jaro kaj ankaŭ la jarkunvenon por 2003, je 16 marto 2003, en kiu ili elektis Erin McGifford kiel Prezidanton kaj Dave Dewar kiel Sekretarion/Kasiston. Ili bedaŭras la forpason de Bill Harding.

Ross raportis por la Esperanto-Rondo de Wellington. La Rondo kunvenis monate krom en januaro. Ĉiufoje membro prezentis programon.

Donald raportis kiel komisiito pri scienco kaj pri la retejo de NZEA. Dum la jaro la Estraro de NZEA decidis preni la domajnan nomon www.esperanto.org.nz kaj movi la retejon al nova retprovizisto. Ek de septembro 2002, la adreso de nia oficiala retejo estas www.esperanto.org.nz sed la malnovaj retadreso validas intertempe. La intenco estas forigi nian informon el la malnova. La nova retejo havas novan aspekton. Donald aldonis plurajn fotojn al la *Australian and New Zealand Esperanto Dictionary*, kiu nun estas konsultebla ĉe www.esperanto.org.nz/anzed/anzed.html tamen membroj estas bonvenaj sendi digitajn bildojn al li. Donald kaj Ross ankoraŭ laboras pri la lastajare proponita kompakta disko por propagandi Esperanton. AEA kunlaboras. Kelkaj eventoj — konferencoj ktp — estas menciitaj. Membroj eble volus kontribui al eo.wikipedia.com kiu estas kvazaŭa enciklopedio

en Esperanto pri ajnaj temoj. Ĝi jam enhavis 4500 paĝojn je la fino de 2002.

Brian raportis kiel komisiito pri korespondaj kursoj. Multaj homoj faris kursojn dum la jaro, eĉ la malfacilan kurson *Paŝoj al Plena Posedo*.

Bradley diris ke nemulto pri informado raportindas. Ross demandis ĉu io okazis pri *Indiĝenaj Dialogoj* kaj *Bradley* respondis ke la Estraro pritraktos tion se kaj kiam ĝi ricevis proponon de ID.

Lingvaj kursoj

Sabate kaj dimanĉe matene okazis studsesioj en du grupoj. Franciska gvidis la progresantojn, kiuj komencis ĉiun sesion per spirekzercoj kaj ludoj. Dum la du matenoj la grupo diskutis kaj analizis tekstojn de Tibor Sekelj por plibonigi lingvajn lertojn kaj komprenon. Progresantoj ankaŭ verkis kantojn kaj skeĉojn por distri la ĉeestantaron en plena kunsido.

La pliprogresintoj aranĝis la proprajn agadojn. Ili diskutis diversajn aferojn pri gramatiko kaj prononcado, kaj kune tradukis mallongan rakonton de John Clarke titolitan "Plia gazo". Brian respondas pri ĝia eventuala publikigo.

Sapskatolo

Sabate posttagmeze okazis sapskatola sesio. Diversaj partoprenantoj staris sur la skatolo kaj alparolis la aliajn pri memelektita temo. Ekzemple: *Frank* fantaziis pri kiam li regos la mondon. *Franciska* parolis pri seksismo en lingvoj. Ŝi ankaŭ preferas uzi "ci" anstataŭ "vi" kiam temas pri nur unu alparolato. Per ia ĵonglado de vortoj *Howard* tradukis la anglan "female" al "fiviro". *Bradley* parolis favore al "Zesprimil", la "ĝusta fundamenta Internacia Lingvo". *Julie Regal* parolis pri paco.

Paroladoj

Ankaŭ sabate *David* parolis pri la historio de Akaroa, vizitota dum la ekskurso je lundo.

Erin parolis pri profesoro Bickerton. Li estis fonda profesoro de la Universitato de Canterbury kaj li instruis fizikon al Ernest Rutherford. Li distris la publikon per lekcioj pri scienco kaj eksplodoj en la epoko antaŭ la kinejo. Li kaj Kate Shepard estis esperantistoj en Christchurch dum tiu epoko.

Gwenda parolis pri libroj: unu de Bertram Potts, artikolo de Julie, kaj okpaĝa kurso de Donald Broadribb. La gazeto *Eventoj* nun aperas nur elektronike: ne plu papere.

Skeĉoj

Post la lasta lingvosesio la progresanta grupo prezentis skeĉojn. *Franciska* mem prezentis la faman paroladon de Hamleto "Esti aŭ ne esti..." *Howard* prezentis el "Esperantuja Televido" "Jen la Novaĵo – nu preskaŭ-amuzan skeĉon pri unuafoja prezentisto, ĉiam interrompita de "sinjoro Kvalitkontrolisto". *Brian* enkondukis rakonton de John Clarke (ankaŭ konata kiel Fred Dagg). *Šandor Monostori* legis la esperantan tradukon kaj *Brian* poste legis la anglan originalon. *Gwenda* raportis pri Internacia Ligo de Esperanto-Instruistoj, kies aŭstralia sekcio komenciĝis en 1997. Ĝia revuo estas *Internacia Pedagogia Revuo*. *Brian* parolis pri prononcado de Esperanto. Li observis ke en la fruaj tagoj la dalmataj esperantistoj en Aŭklando pli bone prononcis ol anglalingvanoj. Nun la situacio estas pli bona.

Erin montris filmon pri la Universala Kongreso en Montpeliero en 1998. Ross montris filmon pri la Internacia Junulara Kongreso en Pato Branco, Brazilo. Ĝi interesis pro la integriĝo de Esperan-

to en la urbo Pato Branco kaj la inaŭguro de granda pordego honore al Zamenhof ĉe la enirejo al apuda komunumo, "La Espero".

Jarkunsido de Nov-Zelanda Esperanto-Asocio

La jarkunsido okazis en du partoj. La unua, sabate vespere, pritraktis la jarraporton de la Estraro. La dua, dimanĉe vespere, pritraktis la finanĉan raporton kaj elektis oficistojn por la jaro 2003-2004. Elektitaj estis Bradley McDonald (prezidanto), David Dewar (vicprezidanto), Howard Gravatt (sekretario), Kris Krageloh (helpsekretario), Jaquie Fox (kasisto), kaj Daphne Lawless kaj David Ryan (estraranoj). La ĉeestantoj aplaŭde gratulis la kasiston pri la klare prezentitaj kontoj de la Asocio kaj dankis la estraranojn pro ilia laboro dum la lasta jaro.

Ekskurso

Lunde por la ekskurso ni lasis la kongresejon tuj post 09:30 survoje al Akaroa. Nia ŝoforo Graeme (eksprofesoro pri hortiko ĉe Universitato de Lincoln) klarigis pri diversaj aferoj survoje. Ni haltis por tetrinki ĉe Little River kaj ĉe la fromaĝfabriko en Barry's Bay. Ni alvenis en Akaroa je la tagmezo kaj serĉis lokojn por manĝi, ĉiu laŭ sia bontrovo. Kelkaj vizitis la malgrandan muzeon kaj spektis filmon pri la evoluo de la distrikto ekde la antaŭhistoria epoko. Je 14:30 ni ekveturis ree al Christchurch, ni atingis la kongresejon je 17:00.

Festeno

Je 18:00 ni kunsidis en restoracio Tandoori Palace. Kompreneble la manĝaĵo estis hindstila, spica kaj ruĝa.

Post ĉirkaŭ tri horoj da babilado, ŝercado kaj manĝado, ni disiĝis post ĝuinda kongreso. □

Libroservo de AEA

Ekde la 10-a de majo 2003 la nova libro-kaj abonperanto por Aŭstralio estas:

Libroservo de AEA
ĉe Daniel Forrest
22 Clydebank Ave
Busselton WA 6280
Tel. +61 (0)8 97 544 714

Raporto de Sid Wolifson

1. Ĉiujn komunikojn por la Libroservo sendu al la supra adreso.

2. La Libroservokonta kodo-adreso ŝanĝendas ĉe UEA.

3. La bankkonto en Sydney ĉe NAB havas bilancon de proksimume \$11000. Proksimume \$6000 estos sendita al W.A. kaj \$5000 retenata en Sydney por pagi la kostojn de sendado kaj pakado de libroj. Tiu sumo estos replenigenda de tempo al tempo el WA.

4. Ĉiuj libroj restos en Sydney en Redfern kaj libromendoj ricevitaj el W.A. estos dissenditaj el Redfern.

5. Ĉiuj mendoj por libroj estos sendataj de la oficejo en W.A. al Redfern kune kun 1a fakturo, kiu inkluzivas poŝtkostojn je 10% de la vendoprezo de la libroj.

6. NSW retenos dosieron de ĉiuj sendaĵoj kaj pakigaĵo tra la poŝto, kaj estos respondeca por inventaro kaj jara inventaro. Daniel Forrest ricevos la kodon de nia konto ĉe UEA kaj la nomojn de la kontaktpersonoj ĉe UEA. (vidu punkton 2.)

7. La librokatalogo estos havebla

por ĉiuj, precipe la oficejoj en W.A., Redfern, kaj UEA.

8. Libromendoj de transmaraj eldonejoj tra la oficejo de W.A. per ĝiriloj estu sendataj al Redfern.

9. Mono kolektita ĉiujare por abon-oj kaj membrecoj estu metita en bankon de la W.A.-oficejo kaj la listo de membroj kaj kontribuantoj estu sendataj al UEA (kun escepto de *Telopeo*, tiuj mono kaj listo estu senditaj al Redfern.)

10. La Libroserva konto ĉe UEA aktuale havas bilancon de proksimume €4500, do la venonta monsendo el W.A. verŝajne ne bezonos okazi pli frue ol post 12 monatoj.

11. La datenoj en la komputilo de Sydney estos metitaj sur disketojn kaj sendotaj al W.A. kune kun ĉiuj MYOB-dosieroj.

12. Pri la komputilo kaj presilo: ili estas la propraĵo de AEA. Post konsidero kaj precipe ĉar Daniel indikis, ke li povus uzi sian komputilon, la estraro de la NSW-Esperanto-Federacio kredas, ke estus utile lasi ilin en Redfern por referenco, se eventuale la Federacio akceptus la financon respondecon pagi por la kostoj de novaj aparataĵoj, kiujn Daniel eble bezonos por ĝisdatigi sian komputilon por funkciigi la Libroservon.

13. La Retadreso de la Libroservo restas sama, la reprovizanta konto estas pagata en Sydney.

Verkita por la estraro de Esperanto-Federacio de NSK de Sid Wolifson □

Nia konkurseto 1:

Rezultoj

Tasko: verki lastan linion por la ĉi-sekva poemeto de Margaret Inglis:

*Sub la arbo atendantante
Inter herboj, bonkaŝante
Ora, blanka, kolorita
Okuloj akre rigardante
Je mateno, ĉe la pordo*

.....

Kontribuis liniojn 7 personoj. Inter ili, venkis Kay Andersen per:

Reĝas kato kiel lordo.

Kontribus ankaŭ jene:

De Henry Broadbent:

Fiere montras sin muso.

De Vera Payne:

Sidas kato en bonordo.

De June Perkins:

Kie diablo estas hundo?

De Rosealie Schultz:

Kato atendas, baldaŭ manĝita

De Franciska Toubale:

La katinon de Fernando

De Bernd Wechner:

- 1) Ja ĉio estas en ordo!
- 2) Muson mortigas per mordoj!
- 3) Birdon mortigas per mordoj!
- 4) Kato sonas kun akordo! (kiel oni traduku "purr"?¹)
- 5) Kat' rigardas kiel lordo!
- 6) Kat' kaj mus' kune per tordo!
- 7) Mortaj musoj! Ja rekordo!
- 8) Kato miras pri la fjordo!
- 9) Birdoj kantas en agordo!
- 10) Kato rigardas al nordo!
- 11) Kato, muso, en amordo!
- 12) Kato revas pri la mordoj!

David Whitmore:

Mortanta muso kompatinda.

Konkurseto 2:

Ni ricevis ĝis nun kontribuojn de Trevor Holton, June Perkins, Rosalie Schultz, kaj Franceska Toubale. Ni akceptos pliajn kontribuojn de rakontet-oj/noveletoj 500- ĝis 1000-vortaj ĝis la 31 de decembro 2003. Ĉiun rakontet-on/noveleton akceptitan por publikigo en *EPK* ni pagos per libropremio. □

Answers for the identification items in "For the Beginner":

1. maleolo
2. banano
3. cerbo
4. pano
5. fromaĝo
6. kubuto
7. ripoj
8. kruro
9. pulmoj
10. mam
11. tomato
12. amboso
13. diamanto
14. ŝtrumpeto
15. boto
16. ŝraŭbo
17. trulo
18. boltilo
19. sonforko
20. trombono
21. papago
22. sacerdoto
23. lumturo
24. ventmuelilo
25. citrono
26. gruo
27. kastoro
28. anaso
29. ŝafo
30. ananaso
31. cigno
32. delfeno
33. astro
34. teleskopo Hubble
35. ŝipo
36. testudo

1. Ronron' - ☞

La Aŭstralia kaj la Nov-Zelanda Esperanto-Asocioj

Aŭstralia Esperanto-Asocio:

<http://www.esperanto.org.au/>

Prezidanto: *Matthew Maquire*, 4 Nioka Rd, Narrabeen NSW 2101. maquirem@optushome.com.au.

Vicprezidantoj: *Jennifer Bishop*, 39 Hill St, Hawthorn Vic 3122. ☎ 03 9818 7358 (AH), 03 9905 2806 (BH). esperanto@education.monash.edu.au.

Terry Manley, 55 Alagalah St, Narromine NSW 2821. teren@mail.ans.com.au

Sekretario: *John Gallagher*, 81 Lalla Road, Lillydale Tas 7268. abcetc@ozemail.com.

Helpsekretario: *Hazel Green*, 44 Toowoomba Road, Oakey Qld 4401, Aŭstralio. hazgreen@twmba.net

Kasisto: *Stephen Pitney*, 57 Denham St, Hawthorn Vic 3122. Pitney@Cybernetint.net.

Helpkasisto: *Ken Rolls*, 31 Miller Crescent, Mount Waverley Vic 3149. kenjohnrolls@yahoo.com.au

Kotizoj:

Aŭ\$30 por individuo aŭ klubo (+\$5 por familianoj] ĉe la sama adreso); \$20 por studento aŭ pensiulo; asocia membreco: \$10. Bonvolu sendi vian kotizon al la kasisto.

Nov-Zelanda Esperanto-Asocio:

www.esperanto.org.nz

PO Box 8140, Symonds St, Auckland 1035
Prezidanto: *Bradley McDonald*, PO Box 8140, Symonds St, Auckland 1035. ☎ 09 579 4767.

bradley@esperanto-lingvo.org

Vicprezidanto: *David Dewar*, 4 Harlech Mews, Avonhead, Christchurch 8002.

gddewar@ihug.co.nz

Sekretario: *Howard Gravatt*, PO Box 8140, Symonds Street, Auckland 1035. ☎ 09 626 6129.

hgravatt@ihug.co.nz

Helpsekretario: *Kris Krageloh*, 20 Alec Craig Way, Gulf Harbour, Whangaparaoa 1463.

Kasisto: *Jackie Fox*, PO Box 8140, Symonds St, Auckland 1035. ☎ 09-826 2081.

brianandjackie@abztrak.co.nz

Kotizoj:

NZ\$40 por individuo, \$50 por geedza paro, \$10 por studento aŭ junulo (< 20-jara). Klubo: \$1 por ĉiu ano. Bonvolu sendi vian kotizon al la kasisto.

Esperanto sub la Suda Kruco

Redaktoro: Donald Broadribb

PO Box 643, York WA 6392, Aŭstralio. ☎ (08) 9641 1937. 📠 (08) 9641 1134. E-poŝte: sudakruco@sudakruco.org. Retsito: <http://sudakruco.org>. Membroj de AEA kaj NZEA aŭtomate ricevas *EPK*-on. Prezo de pliaj ekzempleroj de *Esperanto sub la Suda Kruco*: por membroj de AEA kaj NZEA, po Aŭ\$3 + poŝtsendkosto; por nemembroj, \$4.25 + poŝtsendkosto. Menu de la Libroservo de AEA. Abonoj ekster Aŭstralazio kostas €23,70; pagu al la konto aeal-w de la Libroservo de la Aŭstralia Esperanto-Asocio ĉe UEA.

Artikoloj de aŭtoroj nomitaj estas © 2003 de la respektivaj aŭtoroj. Ĉio alia en ĉi tiu numero de *Esperanto sub la Suda Kruco* estas © 2003 de la Aŭstralia kaj la Novzelanda Esperanto-Asocioj. Represo de enhavaĵo estas permesata, kondiĉe ke la fonto estas nomita.

Ĉi tiu numero de *EPK* estas kompostita kaj aranĝita de Donald Broadribb per iMac. La programo uzita estas FrameMaker. La tiparo uzita estas New Century Schoolbook. La reteldono estas preparata uzante Acrobat-on.

Specialaj kunlaborantoj:

Odlo Bokserp, I.N.K, K.R.A.J.O.N, K.R.E.T

Prezidanto de la Internacia Asocio de Presmisionistoj

Vera Doloro, L.M.K.

[lia multsuferta kontrolanto]

Wholly printed in Australia. Typeset by Donald Broadribb, P.O. Box 643, York WA 6392, Australia
Printed by Monash University, Wellington Road, Clayton Vic 3168, Australia